

# ESPERANTO

## TRIUMFANTA



Internacia

SEMAJNA

Neŭtrala

Abonon ĉiu pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, aŭ per ĉeko, sed ne per poŝtmandato. — Abonantoj, kies abonon estas finiginta, ricevas ĝustatempe **admonilon**. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero.

Por Abono oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — **Prezo de unu numero:** 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 sved. kr., 0.30 sviz. fr., 0.30 dana aŭ norvega kr., 0.30 peseto, 3½ pencoj, 0.50 fr. aŭ belg. fr., 0.70 liro, 1.20 fmk., 1.40 ĉ. kr., 3 germ. mk. (ankaŭ por baltaj kaj balkanaj ŝtatoj; por rusoj 1 germ. mk.), 7.50 hung. kr., 55 pol. mk., 55 aŭstr. kr.; internacie 1½ respond. kuponoj.

Por adresŝanĝoj ni kalkulas la prezon de 3 numeroj. — Liston de niaj Abonejoj en diversaj landoj vidu sur paĝo 4! — Germanoj gvas altan profiton, se ili abonas ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 13 Nachtrag, Ergänzungsheft n-o 3, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“).

Se ĉiu abonanto  
varbos unu novan  
abonanton, ET povos  
esti ses-paĝa.

ELDONANTOJ:  
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gili Norta, Barcelona  
Teo Jung, Köln (Kolonjo)  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

REDAKTOROJ:  
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.  
Kun-redaktoro: M. Butin.  
Felictona red.: Zanoni.

ADMINISTREJO:  
Horrem bei Köln, Germ.  
Poŝtekonto Köln 70865,  
por Teo Jung, Horrem.

ANONCOJ  
el ĉiuj landoj 4 germ. mk.,  
po cm², ĉe grandaj aŭ  
ripetataj anoncoj rabato.

Numero 81 :: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :: 23. Aprilo 1922.

## En Genève.

Alveno de la Konferencanoj en Genève.  
La Paskaj Tagoj. (Vidu pĝ. 3.)

### Béziers.

Béziers, senkompara ebenejo, senĉese karesata de la spiro de l' maro, ĉirkaŭata de montoj, kiuj kliniĝas al ĝi kiel al spektaklo laŭvice idilia kaj heroa, Béziers, kvazaŭa kuvo skulptita de la naturo, por ke en ĝi fermentu la penso kaj la ago, Béziers estas urbo de 56 000 loĝantoj.

Ĝi estas admirinde lokita sur monteto, ĉe kies nord-oriento fluas beleta rivero *Orb*. Tiu rivero estas transirata de Suda Kanalo fosita de Paul-Riquet, naskiĝinta en 1604. Je unu kilometro de la urbo komenciĝas serio da kluzoj tre proksimaj unu al la alia kaj kiu, laŭ longo de 300 metroj, nombriĝas je naŭ. Iom pli malproksime, ili dupartiĝas; unu parto falas en la riveron kanaligitan, poste forlasas ĝin kaj reatingas la alian brakon, kiu pasas je 15 metroj super la rivero sur pontego nomita Pont-Canal.

La aleoj Paul-Riquet, sur kiuj staras la statuo de Paul-Riquet (de David d'Angers), filinoj de la Platano-promenejo, estas fariataj por la kalkulo de la komerco kaj por la interŝanĝo de la ideoj. Malnova Gaŭla civito de *Volces Tectosages*, ĝi estis okupata de la Romanoj ĉirkaŭ la 120-a jaro kaj enhavis kolonion en la jaro 52-a antaŭ Jesuo-Kristo. Sankta Aphrodise, kiu sur kamelo veturis en ĝin por prediki kristanisman, havis la kapon eltrancita, kaj, laŭ la tradicio, kamelo el ligno kaj tolo estas konservata kaj promenigata tra la urbo dum la festotagoj.

La Vizigotoj ekokupis Béziers-on en 418; la Sarazenoj dum 736. Ĝi estis detruata de Karlo Martel dum 736, sed renkonstruata de lia filo. La genio de l' famkonata Molière nutris nia vino kaj nia suno. En Béziers li prezentigis kelkajn el siaj verkoj kaj, unufoje, „Le Dépit Amoureux“ (La Ama Spiĝo). Oni multe skribis pri la vojaĝadoj de l' glorfama aktoraro en la Béziersa regiono, dum 1649, 53, 54, 55, 56, kaj ofte rakontata estas la legendo pri la vojaĝo de Pézenas ĝis Béziers en omnibusaco, al kiu estis

jungitaj du blindaj ĉevaloj kaj unuokula ĉevalino (50-jara), kiu blindiĝis dum la vojaĝo; ĉi tiun la aktoraro devis piedfidi.

Naskiĝis en Béziers Péron, historioskribinto de l' glora reĝo Ludoviko XIV-a, kiu pasigis tri jarojn en karcerado de „La Bastille“ kaj tie havis kiel kunvivanton araneon, kiun li kutimigis manĝi en lia mano.

Béziers estas ankaŭ la naskiĝloko de Viennet, de l' Franca Akademio; de Injalbert, membro de l' Franca Instituto (kelkej bustoj de li verkitaĵoj ornamas nian promenejon „Le Plateau des Poètes“), de Pierre Jalabert, la juna poeto, kiu sus publikigis „La entuziasma vivo“. Tiujn versojn li verkis sub la pala Pariza ĉielo, sed la semo devenas de l' Béziersa grundo, kaj la brila Béziersa suno naskis ilin.

Postsignoj de Romana amfiteatro estas ankoraŭ videblaj en la malnova kvartalo Saint-Jacques. Rimarkinda monumento estas la Katedralo Saint-Nazaire, konstruata de la XI-a ĝis la XV-a jc., kiu superstaras la Orb'an valon. En ĝi ĉiindaj estas interesa peristilo kaj sus malkovritaj freskoj, kiujn kaŝis dikaj kalkaj tavoloj.

Vidindaj estas ankaŭ la kapitejoj, kies eksteraj muregoj kun malgrandaj turetoj estas la restaĵoj de la antikvaj urbaj fortikajoj.


Béziers estas ĉefurbo por la vino kaj la alkoholoj, kiuj estas la nuraj produktoj de la regiono. Béziers produktas de 400 000 ĝis 500 000 hektolitrojn da vino. J. E. (Béziers).

### Kongreso de francaj Esperantistoj en Béziers.

La franca kongreso nacia okazonta en Bezierso dum la nunjaraj Pentekostaj festoj entenas en sia organizado la elementojn ja sufiĉajn, eĉ super-sufiĉajn, por ke ĝi estu sukces'ena. Tial, mi ne havus la plej etan dubon pri tiu sukceso, se ni povus ankaŭ neniel dubi la Esperanteman sincerecon de niaj samideanoj. (Daurigo sur p. 2.)

## La Franca Esp. Kongreso

okazos la 3.—5 junio en Béziers.



Béziers. — La Kongresejo (Teatro).

La Brita Esp. Kongreso  
okazos la 2.—5. junio en London.

La Belga Esp. Kongreso  
okazos la 4.—5. junio en St. Nicolas.

La Germana Esp. Kongreso  
okazos la 3.—6. junio en Breslau.

La Ĉeĥosl. Esp. Kongreso  
okazos la 10.—11. junio en Brno-Brünn.

La Pola Esp. Kongreso  
okazos la 6. 8. majo en Warszawa.

La Revelo-Kongreso  
okazos la 29.—30. aprilo en Hagen.

### Elegio al najtingalo.

(Elegioj, 7. j. 1917.)

Verkis V. A. Koskenniemi.

Ankaŭ al mi, najtingalo vi kantis, ho, unu someron.  
Multojn da noktoj sen dorm' vin mi atskultis, nur vin,  
Oran feliĉofadenon ŝpinante ĝis nova mateno.

Fluis la fluo de temp', mi ne kalkulis pri ĝi.  
Kiel kapito de l' propraj revaĵoj, kaptit' de feliĉo  
Diojn Olimpajn, ho, mi vokis fratige al mi,  
Manon mi donis al nuboj kaj kisís la florojn de kampoj!  
Templon ĉe ĉiu vojfin' vidis mi, gaja migrul'.  
Por mi ekzistis nek agoj, ekzistis nek noktoj nek tagoj,  
Estis nur via kantad'.

Ho, malproksima somer'!  
Ho, najtingal', en memoro de via kantado plubrilas  
Noktaj okuloj, ho, du, blonda, harriĉa kapet'

Ankaŭ al mi, najtingalo vi kantis, ho, unu someron.

El la finna lingvo kun permeso de l' aŭtoro  
tradukis Joh. Edv. Ruotsalainen.

### Elegio pri la silenteco.

(Elegioj, 4. j. 1917.)

Verkis V. A. Koskenniemi.

El la silento ni venis kaj en la silenton ni iros.  
Bruo ne povas de l' mond' al ni fariĝi hejmej',  
Inter ĝi kaj kunular' nekonataj ni iras senpace.  
Kiel en nokt' somnambul', kiu foriris el lit',  
Tiel ni iras per manoj, rigardoj, palpante, puŝante  
Unu l' alian, sur ter' migras nur blindaj ni plu.  
Mankas al nia animo kvieto eĉ inter feliĉo,  
Nia rapidas sopir' antaŭ ni, en malproksim',  
Iras al io, ni kion ne konas, ne povas l' okulo  
Vidi, nek aŭdi ore!, nek ekposedi la man'.

Celoni de nia vojaĝo la mondo kurtene enkaŝis,  
Mondo per sia tumult' trompis orelojn al ni.  
El la silento venante kaj en la silenton irante  
Vin, somnambulon, ho, hom', via kondukas voje!'

Foje, post mond', al vi plaĉos sur lit' de l' silento dormadi,  
Plaĉos tre bone al vi, koro, batanta sen pac'.

El la finna lingvo kun permeso de l' aŭtoro  
tradukis Joh. Edv. Ruotsalainen.

### Elegio al Printempo.

(Elegioj, 2. j. 1917.)

Verkis V. A. Koskenniemi.

Ree vi venis, Printempo, kun helaj matenoj, vesperoj,  
Traŭs odore vi nin, traŭs kantante vi nin.  
Ho, plej miriga el miroj, Printempo, je via alveno  
Ree juniĝas la mond', ree fortiĝas la ter'.  
Eĉ al l' infano de l' tero vi kredon kaj revojn redonas,  
Ree permesas vi min trinki el via helec'.  
Sed nun, ho kial mi aŭdas, ke harpon de viaj radioj  
Fremda ludadas fingrar', ludas fingraro de morti!  
Ho, vi Printempo, vi foje revenos kun manoj plenplena!  
Sed mi forestos, ho jes, fore, en sablo de l' ter'.  
Mia ne sonos kantado kun kantoj de knaboj en laŭboj,  
Mia ne povos rigard' sekvi knabinojn al lud'.  
Kiam sur kampo printempa kun blankaj vualoj kaj gazoj  
Iros la rondodancad' kaj la knabinoj por kap'  
De la heroo de ludo nodligos kroneton el floroj,  
Ligos por kapo de knab', kiu amvenkis en lud'.  
Inter sovaĝaj violo, papavo kaj roz' nekonatajn  
Florojn kreskiĝos la ter', strangajn odorojn zefir'  
Portos el randoj ĉielaj kaj nuboj en oro helbrilos,  
Kiel nuntempe, sed mi ilin ne vidos, ho ne.  
O ja, Printempo, vi foje alvenos kun helaj matenoj,  
Sed mi forestos, ho jes, fore, en sablo de l' ter'.

El la finna lingvo kun permeso de l' aŭtoro  
tradukis Joh. Edv. Ruotsalainen.

### Epitafo de filozofo.

(Sydän ja kuolema, V p. 1. 1918.)

Verkis V. A. Koskenniemi.

Tie ĉi kuŝas mi, apud landvojo, sub ombro alva,  
Tien ĉi mia edzin', kara, tombiĝis, ho min,  
Tuj rapidante de mi al la kol' de unua migrulo.  
Pasis jarcentoj laŭ voj', dum mi dormadis en polv',  
Iris riĉul', almuzulo kaj iris saĝul', arlekeno,  
Sed ne eĉ unu laŭ ĝi iris feliĉa migrul'.  
Vojon migranta, ĵus preteriranta, bastonon formetu,  
Apudsiduĝi, amik', restu kun morto-atend'!  
Kion vi serĉas, ĝi estas nek antaŭ vi nek malantaŭe:  
Antaŭ vi estas landvoj', post vi samestas landvoj'.

El la finna lingvo kun permeso de l' aŭtoro  
tradukis Joh. Edv. Ruotsalainen.

### Epitafo de infaneto.

(Sydän ja kuolema, V p. 1. 1918.)

Verkis V. A. Koskenniemi.

Venis el nokto en nokton mi, lumon apenaŭ mi vidis,  
Eĉ la matenon el tag' mi ne ekvidis de l' viv'.  
Ho, ne esperis en mondon min oni, mi mem ne esperis,  
Estis okaza deven', naskis min nura hazard'.  
Stranga tumulto ĉe mia tombeto senĉese sonoras,  
Paŝoj rapidas kaj jen sonas stariĝo, jen fal'.  
Supre migranta, en tago de l' vivo, ho, diru al mi jam:  
Kien rapidas la ar', paŝoj ĉe mia tombet'?

El la finna lingvo kun permeso de l' aŭtoro  
tradukis Joh. Edv. Ruotsalainen.

Rimarko de la Redakcio. La tradukinto de ĉi supraj elegioj akompanis sian manuskripton per jenaj klarigoj: ... mi sendas kelkajn elegiojn de la plej nobla kaj fama finna poeto Veikko Antero Koskenniemi. Li estas la plej konata finna elegiisto, kaj estas iom da liaj poemoj el la finna lingvo jam tradukitaj. Krome li estas du-tri-foje premiita de la finna ŝtato. La aŭtoro afable permesas la tradukon de siaj verkoj en la internacian lingvon.

Efektive, kiom ajn brilaj estos la festoj, kiom ajn serioza estos la laboro, kiom ajn impresa ni preparis la manifestadon, ĝi impresos tute ne aŭ malfavore la neesperantistaron, se nia kongreso ne estos kiel eble plej multnombre vizitata. Ne la nura bono de l' preparado efektos sur la publikon, tion oni ja komprenas pro ĝia evidenteco. Ĉu iam okazas al iu, ke ĝi nutrigas nur rigardante kuiradon? Mialflanke, mi povas aserti, ke mi ricevas tute malan efikon, tio estas, mi ricevas dekbolan apetiton. Same kaj tute nature, la Beziersa publiko kaj precipe la urbestro estis apertigitataj de ĉio al ili komunikita pri la organizo de l' kongreso, kaj ili plene seniluziĝis, se ili ne vidos en sia urbo tiel multajn kongresanojn kiel, laŭ ilia opinio, meritas tia kongresaranĝo. Kompreneble, ilia impresio pri la kongreso ne restos en la Beziersaj muroj; pro tio estas nepre necese, ke disvastiĝu bona impresio, pro tio ni neniam sufiĉe admonos, ke oni ne kontentigu per paroloj, per sukcesdeziroj aŭ aliaj ĉelipaj esprimoj, sed per efektiva ago, realaj faroj, t. e. ĉeesto ĉe la kongreso. Ĉar, anstataŭ banala kunveno, tiu kongreso povas iĝi gravegaĵo por nia movado en Francujo, kaj rebato por nia tuta movado ĝenerale, unue per la laboro el ĝi produktota, due kaj ĉefe per la propagando, kiun ĝi naskos. Sed, ankoraŭfoje, por ĉio ĉi ne sufiĉas bela organizado, sed estas bezone, ke la ĉeestantaro estu sufiĉe grandnombra, por ke oni povu diri „kongreso“. Ni cetere esperas, ke tian nomon oni rajtos doni al ĝi, kaj volonte fidus la Esperanteman sincercon pli supre aluditan. Ĉiu certe konscios, ke Esperanto estas irnda je kelkaj personaj aferoj, ĉiu klare ekvidos, kia estas ĝia devo. Bonvenintaj kaj gojege akceptataj estos la Italaj kaj katalunaj samideanoj, kiuj, pro sia proksimeco al nia kongresurbo povos facile alveturi ĝin. Ilin ankaŭ ni do insiste petas, ke ili per sia ĉeesto plifirmigu nian kongreson: ĝi havos tiamaniere ian internacian karakteron kaj iĝos des pli interesa ne nur por ni, Esperantistoj, sed ankaŭ, kaj plej dezirinde, por la neesperantemuloj, kiuj kutimas konsideri Esperanton kiel sendanĝeran ŝercaĵon, kvazaŭ mildan frenezajn!

Aliparie, mi ne troige skribis, certigante, ke la kongresa organizo meritas plenan sukceson. Inter aliaj logaĵoj mi nur citu la prezenton de „Phèdre“ en la arenoj. Tiu perlo de la franca tragedia literaturo, ĉefverko de Racine post „Athalie“, estos ludata de famaj aktoroj el la ne malpli fama Franca Komediejo. Sur la vasta scenejo de la arenoj, meze de majesta dekoracio staronta sub la natura arkaĵo ŝajnigata de la ĉiela bluaĵo, tiu teatraĵo, majstre interpretota, certe egalos festenon por la plimulto. Kaj alia plezurfonto estos ankaŭ la almara ekskurso. Sur la pure blanka sablobordo oni povos tute kviete admiri la imponan spektaklon de la ondoj kurbigantaj, suprensaltantaj, kvazaŭ egaj langoj de iu nevidebla monstro; jen karesantaj, jen furiozantaj, ili fine disŝaŭmiĝas ĉe la bordo, dum la sunaj radioj jetas oran tonon ĉi tien kaj tien, re- kaj trembrilas en la tuta akvaro, ĝin kvazaŭ fajrigante. Unuvorte, delikate impresita restos pri ĝi ĉiu ano de l' kongreso. El ĝi povos eligi tre grava rezultato propaganda, tiam pli, ke kunokazos kun ĝi en Bezierso la 2-a kunveno de la Sud-Orienta Teritorio de UEA.

Nu, estas tute antaŭvideble, certamaniere, ke neniu bedaŭros sian alveturon. Male, la bedaŭro certe estos por tiuj, kiuj ne kuraĝos forlasi du tri tagojn sian hejmon. Rolento, prez. de L. K. K.

## Pri „energia altrudo“.

„Nur energia altrudo de Esperanto enkondukos ĝian praktikan uzadon!“ prave diris en iu numero de ET (n-o 30) s-o P. Balkanyi. Tiel mi ĉiam pensis. Bedaŭrinde tiuj klopodoj, aliĝoj, favoroj pri akcepto kaj uzado de Esperanto estas nur

## La antikvaj Arenoj en Béziers.

Kiel belegaj kaj masivaj estas la Beziersaj arenoj konstruitaj laŭ la antikvaj teatroj romaj! Rimarkinde bone lokitaj ili estas. Sur monteto kovrita de olivujoj kaj vinberoj, la cirko malfermas sian grandegan okulon sub blua ĉielo. De la supraj gradoj de l' amfiteatro oni vidas la lazuran linion de la Mediteraneo kaj la grizbluajn pintojn de l' Cevenoj. Kiel ajn malproksimen oni rigardas, de l' monto ĝis la maro, oni admiras senliman tapiŝon el foliaro verda, kun delikataj kaj precipe tre diversaj koloroj.

Ho! nepriskribebla allogo de teatro lumegigata de ĉielo tute farita el oro kaj lazuro! Ja, en la arenoj, la radioj de l' brilega sudĉielo anstataŭas la palan elektrolumon, kaj la sala aero venanta de la tute apuda Mediteraneo estas pli ŝatinda ol la varmega atmosfero de l' tegmentokovritaj teatroj.

La tagojn de prezentadoj en la arenoj, Bezierso estas vidinda, kurioza. Ĝia loĝantaro viva, vigla, ĝojema, ridema, babilema, tute suda ja, preskaŭ Marseille'a per sia farmanjero kaj sia gaĵeco, laŭiras diversajn bulvardojn ĝis la arenoj. Tuj kiam la pordoj estas malfermitaj, tiu homamaso kriante, gestante, puŝante unu la alian eniras la teatron. Post kelkaj minutoj ĉiuj gradoj estas okupitaj: ne restas plu unu sidloko!

Kaj tiu vibranta popolamaso estas kortuŝata de l' belegeco de l' horizonto etendiĝanta antaŭ ĝi. Tiuj miregantaj homoj ĝojegas antaŭ la magia vidaĵo de l' grandioza dekoracioj, kies supro kunigigas kun la diafana horizonto, kun tiu ĉielo eksterordinara: ruĝega kaj samtempe blua kiel pala turkiso. Ho! Alloga, enorsĉema vidaĵo! Ho! Magio

sur la papero, kaj la komercaj firmoj limigas ilin al la reklamo en Esperantaj gazetoj. Cetere eĉ la aŭtentikaj kaj bruemaj Esperantistoj forgas kaj malzorgas la „energian altrudon“. Mi jam proponis kaj rekomendis al multaj gesamideanoj la precipan zorgon en la praktika vivo: skribi amase kaj obstine Esperantlingve al la grandaj eksterlandaj firmoj, al la institutoj, al la naciaj gazetoj, aŭtoritatoj, eminentuloj, registaroj; skribi ĉiam Esperantlingve, sed ne nur senalie por Esperanto; pli bone estas uzi insiste Esperanton por aliaj aferoj; ne nur peti kaj proponi ĝian enkondukon, pli bone montri kaj efektiviĝi ĝian enkondukon praktike, altrude, surprize.

Antaŭ iu tempo, celante mendojn ĉe la granda firma „Au Printemps“ de Paris, mi petis katalogon kaj sciigojn en Esperanto. La firma respondis al mi itallingve (en mia nacia lingvo); tamen mi denove skribis Esperante, kaj alĝuis sur laleterkovrilon la jenan presitan propagandilon franclingvan: „Sekve de grandaj servadoj de Esperanto en la komerco, mi enkondukis ĝin en mian eksterlandan korespondadon. Mian nacian lingvon mi nur uzas kun miaj samnacioj.“ Mia

Oni bone scias, ke la lingva malsameco estas granda malhelpo kaj granda ridindaĵo en la internaciaj kongresoj, sed la lingva demando restas en la dua vico: nur kiam oni metas sub la okulojn de la kunvenantoj ion por plifaciligi kaj rapidigi ilian laboron, kiam oni montras al ili, kia ilo ekzistas, kaj kiel aliloke ĝi jam estas efike uzata, tiam la lingva demando almenaŭ naskiĝas kaj iniciatas sian vojon.

Tiuj praktikaj „energiaj altrudoj“ estu same zorgataj ĉe la institutoj, la gazetaro, la eminentuloj kaj fine ĉe la registaroj; sed samtempe, „ĉiuj kontraŭ unu“, fide kaj obstine! La tuta Esperantujo, kiel sola lando, havu nur unu celon, nur unu agadon, nur unu direktadon!

Modesta pioniro, sed tute tamen dediĉita al Esperantismo, mi diras mian opinion kaj jetas mian proponon. Al aliaj la ceteron! F. Cesarini.

## Opinioj.

A. Aulard,

konata franca historiisto, profesoro de la Historio de Franca Revolucio ĉe la Universitato de Paris,



edzino timis, ke la firma ne respondos, sed ŝi eraris: ĝi bone respondis, kvankam ankoraŭ itallingve, kaj plenumis miajn petojn. Do: certe Esperanto taŭgis same kiel la aliaj lingvoj, certe la firma ricevis pruvon de nia serioza kaj praktika afero, kaj se ĝi ricevas de ĉiuj landoj — precipe de tiuj, kies lingvon ĝi ne povas uzi — similajn insistajn korespondadojn, ĝi certe komencus forte pripensi nian aferon kaj eble aliĝi al niaj postaj proponoj. Neniel mi sukcesis konvinki kaj varmigi miajn lernantojn, konatojn k. a., kiel per la rimedo skribigi al ili de alilandaj Esperantistoj.

Ĉe nia parola propagando multaj aŭskultantoj, kiuj interesiĝas pri nia laboro, demandas antaŭ ĉio, scieme kaj nekredeme, ĉu oni povas per Esperanto skribi alilandan, ĉu en ĉiuj landoj troviĝas Esperantistoj, ĉu la registaroj, la lernejoj, la komercistaro k. c. interesiĝas pri ĝi. Tiuj el ili, kiuj bezonas aŭ emas aŭ antaŭvidas la praktikan neceson de tiu lingvo, konvinkiĝas kaj varmigas pri ĝi, kiam al niaj vortoj sekvas la faktoj, t. e. la prava materialo pri viveco kaj taŭgeco de Esperanto.

Reciproka internacia helpado estas necesega, internacia praktika laboro estas unua rimedo; kontraŭe la laboro estas, laŭ mia opinio, tro nacie lokita kaj tro malmulte praktika.

fulmoplana kaj tamen tiel delikata de tiu ĉielo de Bezierso, tiu ĉielo kun rozaj flokajoj, kun trenajoj de sukceso, kun cindroj el pala oro sur la ŝanĝiĝema silko de apoteozaj horizonto, tiu ĉielo, kies lazuro estas tiel pura, ke oni rajte komparis ĝin kun la bela ĉielo de Grekujo.

Kaj tuj klam la teatraĵo estas komencita, tiam bruoj, ridoj, interparoloj, ĉio ĉesas. Ĉiu silentiĝas, kaj tiu dankema publiko, vere ema al arto kaj beleco, estas pie atenta same kiel en preĝejoj. La silentado estas solena, impresa.

Roksano en Bezierso.

## Esperanto en Béziers.

„Ĉu „Beziersa Stelo“ estas brila astro?“ skribis al ni samideano, pri kies ŝercemo ni ne povas dubi. Ja, kiu ne scias pri la... brile blindiga brilo de nia stelo?... „Ado“ estas prave uzita, ĉar nia astro ekbrilis dum 1907. Kaj de tiam, ĝi tiel radiis kaj radias, ke ofte ni demandas nin, ĉu ni ŝanĝu ĝian nomon? „Beziersa Suno“ pli multe taŭgis.

Cetere, bonvolu legi kaj juĝi, ĉu mi estas tro pretendema.

Unue, loĝis sur nia planedo viro tiel eminenta, ke la Verdstelanoj ĉiam respektis parolas pri li; efektive, li estas... komitatano de UEA KO—MI—TAT—ANO de UEA!!! ĉu vi ekimigas la radion de nia stelo?

Ho! pli brila ĝi iĝis; ja, dum 1907, estis ludata de Beziersanoj, en „Le Grau d'Agde“, okaze de la dudekjara jubileo de Esperanto, la unua teatraĵeto originale verkita de ĵus aperinta „stelulino“. Ne mokridu, mi petas, pri la alnomo, ĉar tiu verkinto ree kaj ree verkis kaj eĉ estis laŭre-aitno de literaturaj konkursoj.

Certe, aliaj „radiantoj“ pliigis la brilecon de l' lumo de nia planedo; ĝin surloĝas anino de

konata ankaŭ kiel demokrata politikisto kaj pacifisto, kiu en la jaro 1919 estis ankoraŭ partiano de la franca lingvo kiel internacia, skribis pri Esperanto en la grava gazeto „Le Petit Parisien“ de 19. nov. 1920 („La popoloj bezonas internacian lingvon simplan, facilan, oportunan“):

... Se oni volas, ke la Ligo de Nacioj eniĝu en la konscienco de la popoloj; se oni volas, ke ĝi morale vivu, ĉar alie ĝi ne efektive vivos, estas nepre bezone, ke ekzistu internacia popola lingvo, kiu povos esprimi kaj komuniki la ideojn kaj bezonojn komunajn al ĉiuj nacioj...

... Necesa estas lingvo, kiun la laboristoj, kiuj disponas malmultan tempon kaj ne kutimas la lernan penadon, povus lerni dum malmultaj monatoj kaj kvazaŭ ludante. Tio signifas, ke necesa estas lingvo simpla kaj facila. Tia estas neniu natura lingvo.

Kontraŭe, tia estas artefarita lingvo, nomita Esperanto, kiun kontraŭbatalas nur la ironio de frivululoj kaj la misoneismo (t. e. abomeno pri novaĵoj) de la rutinema intelektuloj.

Estas aliaj artefaritaj lingvoj. Eĉ se ili estus ankoraŭ pli bone konstruitaj, Esperanto posedus la superecon, ĉar ĝi pravas sian meriton per sia ekzistado kaj per sia sukceso. Pro la libroj, kiujn la Esperantistoj jam publikigis, pro iliaj gazetoj, pro iliaj kongresoj, kie oni parolas nur

L. K., geanoj de E. L. A., kaj ankaŭ Vicĉefvaga-bondino. Kiuj ekridigos pri tiu titolo, tiuj tute ne scias, ke anigis tiun klubon nur „talentuloj“, nur „artistoj“ laŭ la plena senco de l' vorto. Do, anstataŭ ridigi, demetu viajn ĉapelojn, sinjoroj, kaj kilnu vin ĝis tero.

Dum 1913, oĉ ĵunaj Beziersanoj, sekve de la skribprovoj postulitaj por la konkurso Michelin, ricevis 800 frankojn da premioj. Eĉ tiel kontentiga estis la traduko de „stelulo“, (kies pseŭdonimon oni vidas en la hodiaŭa numero de nia kara ET), ke lia bildo aperis en franca kaj bohema gazetoj.

Kaj antaŭ kelkaj monatoj ekvidiĝis „stelulo“, kiu post dekkvintaga lernado „perfekte“ scipovis nian lingvon kaj kiu pliriĉigos nian Esperantan literaturon proze kaj verse.

La citadon mi ne finis, ne, ĉar mi devas ne forgesi 14-jaran „steluleton“, kies Esperantan lertecon spertis mondojagantoj, kiujn li gvidis dum du tagoj, uzante nur nian karan interkomprenigilon kaj kiun la kongresanoj nepre aplaudis dum la prezento de „Geedziĝopeto“ pro lia kvazaŭa profesia aktoreco.

Pli, „Beziersa Stelo“ havis propran gazeton „Tra la Filatelio“ kaj nun havas revuon „La Interŝanĝo“, kune kun la oficiala bulteno de „Beziersa Stelo“: „Antaŭen“, kiu estos la organo de la Federacio de l' Sudfrancaj Esperantistoj; ĉi tiun fondas „Beziersa Suno“, kies lumado kaj varmego renaskis, naskis kaj naskos satelitojn en sia regiono.

Leginte miajn liniojn, ĉu ĵu povas dubi pri la brileco de „Beziersa SUNO“ kaj pri la brileco de la organizata de ĝi Kongreso de Francaj Esperantistoj? ... Ĉu? ... Mi ne dubas, ke unuavoĉe estas respondante: NE!!! Sekve, mi estas absolute certa, ke, por sperti la agreblecon de tia radiado kaj por igi pli brila

ilian lingvon, pro la entuziasma kaj agema fido, kiu ilin instigas, Esperanto fariĝis eminenta kaj bonega kandidato al la ofico de internacia popola lingvo.

Estante akceptita, tiu ĉi lingvo evoluos per la uzado kaj propropraj pliboniĝos per alkonformiĝo al la bezonoj...

Lastatempe s-o Aulard verkis specialan artikolon pri la sama temo („Deux objections“ — „Du kontraŭdiroj“) por la januara numero de „France-Esperanto“.

## Foiroj kaj Ekspozicioj.

Ekspozicio de Reliefaj Fotografajoj ĉe la Foiro de Lyon.

Ĝis nun, la reliefa sento povis esti havigata, praktike, nur per la stereoskopa metodo. Laŭ tiu metodo, oni fotografas la objektojn per du objektoj lokitaj sur unu aparaton, kiu donas samtempe du bildojn akordiĝantajn kun la vido de la objekto per ĉiu el niaj okuloj.

Tiuj bildoj, lokitaj sur sama ebena, ĉe la distanco akordiĝanta kun la normala interspaco de niaj okuloj, estas rigardataj en la aparaton nomita stereoskopo, kie la duokula vido surmetas iun sur la alian.

La stereoskopia fotografado; krom tio, ke ĝi necesigas specialan aparaton por la vidado de la bildoj, povas nur taŭgi por bildoj havantaj malpligrandigitajn dimensiojn.

Pli la reliefa sento tiel havigata malhavas profundecon, kaj la aspekto similas al tiu de siluetoj, de teatraj dekoracioj; malbone interligitaj. Tial oni trafas tiamaniere nur maldelikatan prezentadon de la objekto vidata en la spaco.

Fine la stereoskopia fotografado bezonas enfokusigon rilate al ĉiu observanto kaj postulas, ke la okuloj estu ne tro malsimilaj. Pro tio ekzistas ne malmultaj personoj, kiuj ne kapablas vidi la stereoskopian reliefon.

La nova procedo de s-o Louis Lumière\*) kiu li nomis „Foto-stereo-sintezo“, estas bazita sur koncepto tute malsama ol la stereoskopia. Ĝi permesas al ĉiuj vidi objektojn tiaj, kiaj ili estas en la spaco, sen la speciala aparato.

La principo de la nova elpensajo estas teorie tre simpla: ĝi konsistas en divido de objekto de difinita diko en serion da paralelaj tranĉaĵoj, interspac-egalaj aŭ ne, kiujn oni fotografas laŭ la sama skalo, efektiviĝante tiun kondiĉon, ke ĉiu bildo prezentas nur la sekcon de la objekto laŭ la ebena akordiĝanta.

Se ĝi temas, ekzemple, pri fari portreton reliefan, sufiĉas dividi fotografe la kapon, el la plej elstara parto (la nazo) ĝis la parto videbla plej malproksime (la orelo ekzemple) en serion da ebenaĵoj vertikalaj. Fotografante ĉiun el tiuj ebenaĵoj, oni havigos serion da negativaj bildoj. Tiuj negativaj povos liveri la saman nombron da pozitivaj bildoj sur vitro per la procedoj kutimaj por akiri tiajn pozitivajojn. La surmeto de tiuj ekzempleroj travideblaj povos restarigi, en la spaco, la ŝajnon de la objekto fotografita. Sufiĉos por tio, ke la interspaco de la bildoj surmetitaj estu sama kiel tiu de la diversaj ebenaĵoj fotografitaj.

Malgraŭ ke ŝajnas necese, teorie, surmeti nombron senliman da ekzempleroj senlime pli-proksimigitaj, por havigi restarigon perfektan de la objekto, tiu kondiĉo ne estas praktike necesa, kaj la sperto aperigis, ke malgranda nombro da bildoj sufiĉas por doni al la okulo la senton de la kontinuo, se ĉiu bildo akordiĝas, ne al ebena,

\*) Louis Lumière, fama Lyon'a scienculo kaj industriisto, ano de la Instituto de Francio, kiu kun sia frato Auguste Lumière, eminenta biologo, eltrovis la kinematografon. S-o Louis Lumière estas honora membro de la Grupo Esperantista de Lyon.

nian astron, kongresaniĝos ne nur nenombrelaj francoj, sed ankaŭ multaj eksterlandanoj. Al ĉiuj, kiuj veturos al ni, tulkoran antaŭdankon! Kaj, post la 5-a de junio, ili siavice dankos por la varmkora akcepto kaj por la feliĉoriĉaj tagoj pasigitaj en Bezierso. Homo.

## Nekrologo.

Ni Esperantistoj de la urbo Timișoara (Temesvar, Rumanio) funebras nian plej valoran pioniron, la tribunalan juĝiston

D-ron Marko Pavloviĉs.

Li mortis 65-jara; li estis simpatia, bonkora homo kaj eminentulo en sia fako. Li parolis 11 lingvojn, el kiuj li eme preferis Esperanton. Li estis la unua delegito de UEA en la tuta Banato kaj partoprenis ĉe la Unua Kongreso de UEA en Augsburg kaj ĉe la Sepa Kongreso en Antwerpen.

Ni dediĉis al li belan girlandon, kies rubandoj havis surskribaĵojn en Esperanto. Ĉe lia tombo s-ano Alfr. Bambach (juĝoficisto) faris funebran paroladon en Esperanto.

Honoron je lia memoro!

Fr. Hügel.

**Kiu ne jam resendis la poŝtkarton aldonitan al la antaŭa numero, faru tion tuj!**

# La Edukista Konferenco en Genèvo.

Ĉi tiu konferenco, unika kiel la unua internacia kongreso de edukistoj ĝis nun okazinta, aliris al Genevo imponentan aron da instruistoj de Esperanto el diversaj partoj de la mondo.

Por la akcepto de la konferencanoj estis tre oportunaj aranĝoj laŭ la direkto de D-ro Edmond Privat kaj loka komitato. Akceptejoj starigis en la entrejo al bela mangosalono de la hotelo Richmond, kie deĵoris f-ino Dubois. En tiu hotelo la plimulto el la konferencanoj loĝas aŭ manĝas kaj ĝuas bonan oportunon por interdiskutado.

Dimanĉon, la 16-an de aprilo, matene alvenis la britaj delegitoj. Ili formis la pli grandan naciaron de la konferenco kun 29 membroj el 89 en la oficiala delegitara listo. Tiu listo montras, ke po 1 delegito enskribiĝis el Bulgario, Egiptujo, Finnlando, Georgio, Hungarujo, Rumanujo, Ruslando, Svedlando kaj Ukrainujo, po 2 el Aŭstrio, Belgio, Japanujo kaj Nederlando, po 3 el Ĥinujo, kaj Danujo, 5 el Ĉeĥoslovakio, 6 el Germanujo, po 7 el Francujo kaj Italujo, 12 el Svislando kaj 29 el Britujo.

Dimanĉon posttagmeze gastigis la jam alvenintajn konferencanojn la Geneva grupo „Stelo“ en la ĉarma parko Grange. Bedaŭrinde pro la

kiu estas neefektigebla, sed al volumeno fokusa sufiĉe malgranda.

Se oni povas trafi tiun rezulton per objektivaj tre lumaj, oni konstatis, ke la profunda amplekso de tiuj objektivaj estas tro granda, tio estas ke, por sama pozicio de la objekto, la partoj de la objekto, lokitaj en ebenaĵoj pli aŭ malpli malproksimaj, estas reproduktitaj egalnete, kaj male estas necese, en la procedo priskribita, ke tiu neteco estu ekzakte limigita je la parto de la objekto, kiun oni deziras fotografi.

Por forigi tiun ĉefan malbonaĵon, s-o Louis Lumière elpensis turnigi ĉirke la objektivon kaj la impresblan platon ĉirkaŭ la ĉelada akso, dum la daŭro de la espozio. Je tiuj kondiĉoj, por iu distanco el la objekto ĝis la objekto, ĉiuj punktoj, lokitaj en la ebenaĵo, por kiu la neteco estas perfekta, konservas sur la plato sian bildon nete, dum tiu tuta turniĝo, kaj male la ceteraj punktoj, lokitaj ĉi antaŭ ĉi malantaŭ tiu ebenaĵo, estas des pli malnetaj, ju pli malproksimaj ili estas.

S-o Louis Lumière sukcesis praktike efektiviĝi tiujn kondiĉojn per ordinara fotografa kamero.

La samtempa turniĝo de la objekto kaj de la plato dum la espozio estas havigata per kranko.

La brakoj de la kranko movantaj la antaŭan parton kaj la malantaŭan de la aparato ne estas egalaj, kaj iliaj longoj dependas de la skalo, laŭ kiu oni agas. Tiel por ricevi bildojn laŭ duon-natura grando, tiuj longoj estas: 4 centimetroj por la antaŭaj brakoj; 6 por la malantaŭaj.

La tutaj devas esti ĝuste ekvilibrigita kaj konstruita sen ia movlibero por eviti ĉian tremadon dum tiu turniĝo, ĉar la plej malgrava delokigo malfirmigus la neton de la bildo de la fotografita ebenaĵo.

S-o Louis Lumière spertis, ke perfekta ŝajno de la reliefo povas rezulti de la uzado de nur ses bildoj. Oni do faras sinsekve ses klišaĵojn, ne modifante la enfokusigon de la aparato. Tiu-ĉe, oni alproksimigas, por ĉiu bildo, la aparaton al la modelo, tiel ke oni fiksu sur la serio da klišaĵoj la diversajn ebenaĵojn elektitajn el la antaŭo ĝis la malantaŭo.

Se oni atente rigardas la ses elementajn bildojn, kiuj konsistigas la reliefan portretan fotografadon, oni vidas, ke la neteca maksimumo pasas el la naza pinto ĝis unu el la okuloj, poste ĝis la alia, por atingi fine la orelan malantaŭon.

El tiuj negativoj tiel ricevitaj oni kopias korespondantan serion da ses pozitivaj bildoj, sesope pli malfortaj ol tiu, kiu taŭgas por ununura pozitivo.

Oni kunadaptas tiujn bildojn, laŭ taŭgaj interspacoj, fiksan ilin ĉe lignaj muntkadroj, kiujn oni kolone surmetas kaj poste senmovigas en skatolo, kies fundo konsistas el malpolurita vitro.

Normale laŭ sia akso kaj je konvena distanco rigardataj tiuj bildoj havigas reliefan senton tiel iluziantan, ke oni kredas vidi la kapon mem en la spaco.

pluvo la festeno ne estis tiel sukcesplena kiel oni esperis; sed sub bela kolonado 70 Esperantistoj gaje interkonatiĝis kaj interbabiladis kaj trinkis teon.

Poste oni vizitis la ekspozicion en la Instituto J. J. Rousseau.

Diservo okazis je 6 h. vespere en la kapelo de la Makabeoj ĉe la Katedralo.

En la vespero tre agrabla akcepto okazis ĉe la Virina Ligo por Paco kaj Libereco.

Je lundo matene jam alvenis la plimulto de la konferencanoj. Oni sekvis la modernan pedagogian metodon: *Unue ludi, poste studi*. La ĉefa parto de la tago estis dediĉita al ekskurso sur la bela lago de Lemano.

Pri akcepto en Ouchy-Lausanne ni raportis en la venonta numero.

En la vespero post la reveno al Genevo rimarkinda familia akcepto okazis en la Domo de l' Etuloj de la Instituto J. J. Rousseau.

Ankaŭ pri tiu ĉi akcepto kun paroladoj de prof. Bovet kaj d-ro Privat legu la detalan raporton en nia venonta numero.

La „Foto-stereo-sintezo“ ne povas pretendi anstataŭi la stereoskopion, kiu estas pli simple uzbla kvankam multe malpli perfekta. Ĝi tamen estas rimarkinda eltrovo, aplikinda precipe por portreto, al kiu ĝi donas iluziantan vivaspekton, kiun neniu alia fotografa procedo estis ĝis nun kapabla doni.

Esperantigis Em. Cherblanc kaj L. Poncet, komitatanoj de la Grupo Esperantista de Lyon, delegitoj de UEA.

## Komercio.

### Internacia Konferenco de Rerezentantoj de Foiroj dum la XIV-a.

Kaŭze de tio, ke en Helsinko okazos la XIV-a Universala Kongreso de Esperanto, la direkto de la Praha Internacia Foiro proponis, ke samtempe, simile kiel en la lasta somero dum la Praha kongreso, estu aranĝata konferenco de reprezentantoj de foiroj en diversaj landoj, kaj ke la organizadon de la konferenco, kiel ankaŭ registradon de pridiskutotaj demandoj, prenu sur sin Finnlanda Foiro.

Post kiam ankaŭ la loka komitato de la universala kongreso faris similan proponon, la direkto de Finnlanda Foiro petas, ke la direkto de tiuj foiroj, kiuj havas okazon sendi siajn reprezentantojn al la nomita kongreso de Esperanto, dum aprilo sendu mallongajn referatojn pri demandoj, kiujn ili deziras havi pridiskutotajn en la konferenco de la foiroj. Tiuj ĉi referatoj estos dum majo konigitaj, almenaŭ resume, al ĉiuj foiraj direktoj, kiuj dum aprilo sendas koncernen peton al Finnlanda Foiro. Dum junio la direkto de Finnlanda Foiro atendas informon pri personoj, kiuj ĉe la Esperanto-kongreso reprezentos la diversajn foirojn, kaj sciigon, en kiu vico oni deziras la demandojn pridiskutotaj, post kio la direkto en komenco de julio sendos al tiuj personoj programon de la kongreso kaj tiun de la sekcio por foiraj aferoj. Adreso de Finnlanda Foiro: Fredrikskatan 14, Helsinko.

## Laboristaro.

### Asocia Tago de GLEA.

(Germana Laborista Esperantista Asocio.)  
Düsseldorf, 14.—17. apr. 1922.

La laŭregulare okazinta kunveno, al kiu la plejmulto el ĉiuj GLEA-grupoj sendis siajn delegitojn, montris klare la seriozan volon de la germana laboristaro, disvastigi Esperanton en siaj landoj. La donitaj raportoj estis detale preparataj kaj kritikataj; tamen oni laste esprimis planan konfidon al la prezidanto kaj al la redaktoro de la Asocia organo. Dum la kunsidoj oni ankaŭ kun bedaŭro konstatis, ke en aliaj landoj la laboristoj ne estas organizitaj kiel en Germanujo, kio malfaciligas internacian kunlaboradon de la kamaradoj. En la diskutoj pri la gazeto estas tŭsita la demando, ĉu ne estas preferinde aboni por ĉiuj membroj internacian gazeton kaj aldoni germanlingvan kromfoliojn por komencantoj kaj por propagandaj celoj. Se eble ni donos en venonta numero raporton pri la faritaj decidoj.

## Peto.

La Nacia Ekspozicio de la Memoriga Centjara Datreveno de la Brazila Sendependeco prezentas al Esperanto bonegan okazon por elmontri ĝian forton kaj disvastiĝon. Krom la grava komisiono jam donita rilate al la ekspedo de prospektoj diverslingvaj kaj en Esperanto, B. L. E. okupas apartan ĉambron interne de la loko de l' Ekspozicio. B. L. E. intencas fari grandegan montron de Esperantaro, kaj por atingi ĝin celon ĝi bezonas la helpojn de la tuta Esperantistaro. Ni esperas, ke vi sendos al ni ĝustatempe gazetojn, revuojn, verkojn (literaturajn, lernigajn, muzikajn), katalogojn, glumarkojn, insignojn, propagandajn afiŝojn ktp.

Laŭ peto, ni resendos al vi post la fermo de la Ekspozicio la Esperantarojn de vi sendotajn aŭ ni vendos ilin eventuale je via konto. Tiu-okaze bonvolu montri la prezon.

Altestime  
Brazila Ligo Esperantista,  
Praça 15 de Nov. 101, Rio de Janeiro.

## Germana Esp. Kongreso

(3.—6. junio en Breslau)

anoncis sin ĝis 12. aprilo 341 partoprenontoj. Fakkunsidojn ankoraŭ anoncis blinduloj, malnov-katolikoj kaj monistoj. La kongres-kotizo estas aligitaj je 10 mk. al 30 mk. (por samfamilianoj 25 mk.) kaj sendota al s-o Habellok, poŝteka konto Breslau I, n-o 13987. Por la ekskurso al Riesengebirge oni rekomendas kunporti solidajn ŝuojn kaj varmigajn substavaĵojn. — Inter la aligitaj troviĝas multaj samideanoj el Ĉeĥoslovakio; oni atendas ankaŭ polajn kaj hungarajn samideanojn. Adreso de la kongresa sekretario: A. Hanuschke, Breslau IX, Hedwigstr. 11.

## Mallongaj Esp. Sciigoj.

### Franclando.

La Centran Oficejon en Paris vizitis eminenta s-ano prof. Nakamura, membro de la Japana Akademio de Sciencoj.

Propagandaj paroladoj de la Esp. grupo en Marseille okazis en la scienca societo Camille Flammarion, en la Armeo de Savado, Teozofia Loĝio (kurso sekvis ĝin) kaj en la artista rondo de poŝtistoj.

### Demokratia Internacio Gejunlara.

Rilate al artikolo aperinta en ET n-o 75, ni sciigas, ke la sekretario de la Franca Federacio en la Dem. Internacio Gejunlara troviĝas: 16, rue Saint Séverin, Paris 5. Oni povas skribi tien en Esperanto.

### Bulgaraj studentoj en Germanlando.

En Jena dum kunsido de 23 bulgaraj vegetaraj studentoj s-o Atanasov referis pri Esperanto kaj ĝiaj servoj por la vegetarismo. Rezultis kontraŭ-paroloj, sed ankaŭ solenaj deklaroj pri baldaŭa Esperantistigo.

### Svedlando.

La ministro por instruado rifuzis elekti s-on gimn. instruiston Elias Beckman el Geve kiel oficialan reprezentanton ĉe la Esp. konferenco en Genèvo, kvankam Sveda Esp. Fed. promesis pagi la kostojn por la vojaĝo de la delegito.

En Björnäs (Angermanland) s-o Frans Quist el Nordingra gvidas kurson por 15 laboristoj. — En Garpenberg kurso de instruisto Nanny Asplund kun 11 p. — En Mora 50 personoj partoprenas Esp. kurson. — En Nynäshamn funkcias du kursoj po 15 p. — En Vanas 19 p. studas Esperanton. — 2 kursoj en Västerås. — En Överkalix 40 p. lernas Esperanton.

### La movado en Napoli (Ital.).

S-o F. Cesarini paroladis ĉe Circolo Militare, Istituto Nautico (Mara Instituto) kaj Oficista Asocio; aliajn paroladojn oni aranĝos en aliaj rondo. Li ankaŭ gvidas kurson ĉe la kultura rondo „Rinascita“ kaj ĉe la Mara Instituto. Oni starigis grupon „Gefrataro“ kun provizora sidejo ĉe „Rinascita“. Longaj propagandaj artikoloj aperis en gazetoj „Rinascita“, „Il Goliardo“, „Gazzettino Universitari“. La poliikaj tagjurnaloj raportas pri la Esp. movado, ĉe la nova granda periodulo „Il Mondo“ el Roma. (Komparu la raporton en ET n-o 72.)

### Sampierdarena (Italujo).

Interkonsente kun la urbestro, kiu helpas nian movadon ankaŭ per subvencio, Sampierdarena Esp. Societo daŭrigas sian agadon. Ĉar Esperanto estas oficiale enkondukota en kelkajn klasojn de ĉi tieaj popollernejoj, la 14. marto nia societo komencis specialan porinstruistan kurson, al kiu aliĝis 42 geinstruistoj. Oni ankaŭ malfermis publikan vesperkurson ĉe la urba lernejo Barabino, kun 60 gepartoprenantoj. Ambaŭ kursojn gvidas d-ro Aldo Schmuckher. Kun helpo de la urbestro de Rivarolo Ligure, nia societo malfermis en la vesperlernejoj de tiu najbara urbo alian publikan kurson gvidatan de s-o A. Redolfi.

La 22. marto publika lumbilda parolado de s-ano adv. K. A. Vaona, prez. de Itala Esp. Fed., ĉe societo „Universale“.

La 3. aprilo 45 fervojistaj anoj de la societo fondis Fervojistan Grupon kiel fakon de la societo.

La kunveno de la societo okazas en Villa Scassi (Centra Teknika Lernejo), ĉiulunde vespere je 9 h. Leteradreso: Via Varese 8. Aliurbaj kaj fremdlandaj Esperantistoj ĉiam kore akceptataj.

### En Torino (Ital.)

la 11. aprilo la nova Asocio por Disvastigo de Esperanto malfermis publikan kurson ĉe la komunuma lernejo G. Pacchiotti (via Bertola 8). S-o D-ro Stromboli paroladis. La kurson gvidas s-o Kom. Kav. B. Saccani.

### Usono.


En New York pli ol 40 gelnantoj de Esperanto en „Washington Irving High School“.

En Elk City, Ore., s-o Davis instruas 9 lernantojn.

En Hancock (Michigan) ekzistas finna Esp. klubo.

### Esp. grupoj en Japanlando.

„La Revuo Orienta“ nomas 12 Esp. grupojn en Tokio, 6 en Kioto, 3 en Jokohama, po 2 en Nagoja, Osaka, Okajama, Kanazaŭa kaj Niigata, po 1 en Jokosuka, Odaŭara, Sizuoka, Maizuru, Jamaguĉi Fukuoka, Kagoŝima, Jonago, Ibaragiken, Sendai, Akita, Akitaken, Daihoku (Formosa insulo), Sapporo, Otaru, Hakodate kaj Nafa.



El la urbo de nia Dekkvara: Finna arkitekturo  
Balkono de la Norda Akcia Banko por Komercio kaj Industrio.  
Arkitektoj Gesellius, Lindgreen kaj Saarinen.

## Parolejo.

### 115. La veraj propagandiloj.

La veraj propagandiloj kaj konvinkiloj estas ne-propagandiloj, t. e. verkoj, pri kiuj oni povas diri: „Lernu almenaŭ legi Esperanton! Jen estas verko pri via profesio, preferata temo aŭ satokupo!“ Neniu praktika homo lernas Esperanton por povi legi mil propagandajn gazetojn. Ĉiu nacio devus havi nur unu propagandajn gazetojn. Aliaj Esperantistoj konvinkaj estas verkoj, kiujn ĉe la ne-Esperantistaro povas uiligi aŭ ĝui. Multe ilustrita, bele bindita libro en luksa eldono aŭ poliglota leksikono, kalendaro aŭ geografia karto. (Ch.-G. St.-M., Londono.)

### 116. Pri Esperantaj ekzamenoj.

Jam delonge mi rimarkis, ke por ni estas necesa unu ĝenerala programo pri Esp. ekzamenoj. Kelkaj naĉaj Esp. institucioj jam ellaboris porekzamenajn programojn. Mi nur ne scias, kiu konfirmis ilin.

Ĉu ne eblus starigi unu ĝeneralan programon por superraj ekzamenoj? La programo devus respondi al jena demando: Kion devas scii ĉiu Esperantisto, se li deziras akiri la superan diplomon pri la loko de Esperanto? Ĉerte, en la programo oni devas indiki ankaŭ la librojn, kiuj helpas prepariĝi por la supera ekzameno.

Ĉu tio eble estas la tasko de nia Lingva Komitato? Al mi ŝajnas, ke niaj Universala Kongresoj ne estas kompetentaj pri la programo. (V. Bormanis, Daugavpils.)

## Gazetaro.

- Le Syndicaliste des P. T. T., Paris, 6. 4. (Longa artikolo pri Esp. kaj Sindikalismo, de P. Fillière, kaj Letero el Anglujo, tradukita el Esp. de R. J. Fillière.)
- Neue Zürcher Zeitung, Zürich, 12. 4. (Favora art. pri la Esp. movado.)
- Neue Freie Presse, Wien, 6. 4. (Esp. en Japanujo.)
- L'Index des Industries du Cuir, Paris, Aprilo. (Uzas parte Esperanton.)
- Le Petit Parisien kaj La Liberté, Paris, 11. 4. (Art. pri Esp. konferenco en Genèvo.)
- Esopo, Paris, aprilo. (Art. pri SAT kaj Sennacieca Revuo.)
- Tribune de Genève, 30. 3. (Malfavora art. pri Esp. en unuagrada lernejo.)
- La Suisse, Genève, 31. 3. (Polemiko kun s-o Privat de Schenker, kolegia prof.)
- Observer, London, 26. 3. (Favora art. pri instruado de Esp. en Genèvo.)
- English, London, febr. (Monata gazeto por angla lingvo kiel internacia, parolas pri Esp.)
- Allgemeine Zeitung, Chemnitz, Germ., 11. 4. (Anoncas Esp. kurson ĉe la 3-a urba profesia kaj perfekta lernejo.)
- Reichenberger Zeitung, Reichenberg, Čsl., 11. 4. (Art. pri Esp. konferenco en Genèvo.)
- Il Dovere, Bellinzona, Ital., 4. 4. (Art. pri Esp. de „Esperantofilo“.)
- 8. 4. (Favora art. de Rug. Benetti pri Esp.; sed ni ne konas la 300 Esp. gazetojn, pri kiuj parolas la verkinto.)
- Dzien Kowinski, Kovno, Litov., 14. 3. (Traduko de art. el ET n-o 74 pri la efektiviĝo de la okhora labortago.)

## Recenzejo.

### LIBROJ.


- EL ESPERANTO. Discurso prononciado en el Ateneno de Montevideo el 1. de dic. 1921. De Enrique Legrand. En hispana lingvo. Kun konciza Esp. gramatiko. 38 pg. kaj kovrilo. Eldonejo: Peña Hnos, Montevideo.
- ESPERANTO. 5 Lekc. De Ig. Teichfeld. 32 pg. kaj kovrilo. En pola lingvo. Kun antaŭparolo de D-ro L. Zamenhof. Eldonejo de B. Rudzki, Warszawa. Prezo ne montrita.

### KATALOGOJ, PROSPEKTOJ, ktp.

PROSPEKTO pri la IV-a FOIRO de PADOVA. 8-paĝa ilustr. prospekto en Esperanto. Adreso: Campioniera, Padova, Italio.

### GAZETOJ.

- Oficiala Gazeto Esperantista. 25. jan. — 56 pg kaj kovrilo. — Enhavo: Kunsidoj de la L. K. dum la XIII-a. Sekcio por la Scienca kaj Teknika Fortaro. Sekcio por la Komuna Fortaro. Tria O. Aldono al Universala Fortaro. — Oficiala Protokolario pri la XIII-a. — Unuaj sciigoj pri la XIV-a.
- Sennacieca Revuo. Aprilo.
- Brazila Esperantista. Jan.-febr.
- La Progreso. Aprilo.
- Holanda Esperantista. 13. aprilo.
- La XIII-a. Oficiala organo de la Loka Kongresa Komitato. N-o 4-5. Kun tri ilustraĵoj. — Kiel aldoni la lastaj folioj de la komedio „Nokto en Karluv Tyn“.
- Ukraina Stelo. Monata organo de ukrainaj Esperantistoj. Eldonita de „Bystrycja“, Stanislavov, Lypova 1, Galicio. Nove reviviginta gazeto, kiu jam aperis antaŭ la milito. Espreble ĝia reapero rezultigos novan ekfloron de Esperanto en la ukraina teritorio. Jarabono 1000 pmk. 150 gmk. 20 fk.
- Konkordo (estinta „La Provo“). Aprilo. Aperas nun en pli granda formato. Adreso: Zagreb, Jugoslavio, Jezuitska 1, ĉe D-ro Dušan Maruzzi.
- Verda Ufojio. Febr.
- La Suda Kruc. Febr.
- Corriere Balcanico-Esperantista. Marto.



El la urbo de nia Dekkvara: Finna arkitekturo  
Ĉefa fronto de la Hipoteka Societa Banko.  
Arkitekto Lars Sonck.

Nederlanda Anonima Societo  
**Luksa-pan Fabrikoj**  
antaŭe Henri J. Carels.  
50 Butikoj:  
Den Haag, Haarlem, Amsterdam.

**Lunĉejo Carels**

(ĉefo: H.A. Scharwächter)  
63 Weimarstraat, Den Haag.

Oni parolas Esperanton.

Nederlanda  
Esperanta  
Komerco-  
Oficejo

(Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau)  
Di ergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝargas per la dissendo de cirkuleroj.

Prizorgas la anoncadon en Nederlando.  
Interrilatigas kun nederlandaj komercistoj kaj industriistoj.  
Sciigas la kurzojn de valutoj kaj valorpapiroj.

## La Interŝanĝo

Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondantoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojojn jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aliĝantoj sendatan nur al la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj.  
Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.  
A. Bonnefous, Direktoro, Béziers (Hérault),  
Francujo, 3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

## Esperanta Finnlando

Internacia Revuo riĉe ilustrata.

Speciala informanto pri la XIV-a Universala Kongreso de Esperanto.

Bonsila, nur Esperanta, interesa.

Necesega por ĉiu kongresano kaj por ĉiu nekongresano.

Prezo de jara abono:

1.25 dolaroj, 3.50 guldenoj, 5.— svedaj kronoj, 6.— danaj kronoj, ŝilingoj, svisaj frankoj, 7.— norv. kron., pesetoj, 15.— francaj kaj belgaj frankoj, 20.— litoj, 30.— finnaj markoj, 45.— ĉeĥoslov. kronoj, 50.— germanaj kaj litovaj markoj, rumanaj kaj bulgaraj levoj, 55.— dinaroj, drakmoj, 200.— hungaraj kronoj, 225.— estonaj markoj, latvaj rubloj, 400.— aŭstraj kronoj, 800.— polaj markoj.

Specialaj favorprezoj por kongresanoj.

Abonojn akceptas

Esperanto-Oficejo Finnlanda, Kasarminkatu 20,  
Helsinki.

## Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj) kostas po du enpresoj kaj po 20 vortoj 0.20 dol., 0.50 fl., 1 nord. kr., 1 ŝil., 1 svis. fk., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fk., 3 lit., 7 fmk., 8 kĉ., 25 gmk., 60 hung. kr., 250 pmk., 250 aŭstr. kr., internacie 5 stamp. resp.-kup.; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdeze de la abonanto, de aliaj ni enpresas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas alveni 10 tagojn antaŭ publikigo.

SERĈATA PERSONO. — S-o Porta, S. Pellico 1, Torino, Italio, petas informojn pri Giuseppeina Surgumova, kiu loĝis en Kievo, Puŝkinskaja 19, loĝejo 23.

ESPERANTO PRAKTIKO. Mi deziras aĉeti Esp. Praktiko 1920, n-oj 1, 5, 6. Alsendo kontraŭ pagoŝarĝo al Otto Lumpe, Trautenau, Ĉeĥoslovakio.

D-RO L. L. ZAMENHOFA BILDO laŭ originala pentraĵo sur belega papero (granda 25 x 32 cm.), necesa por ĉiu Esp. hejmo, ĉambro, grupo, societo, kurso, kunveno; vera donaco al ĉiuj progresemaj kursantoj; kostas 55 germ. markojn. — Dudek diversaj Esp. poŝtkartoj, siluetoj kaj portretoj de Zamenhof, belaj propagandiloj en arta Esp. maniero, kostas nur 20 germ. markojn. Kune kun la granda Zamenhof-bildo 50 germ. markojn. — Sendas P. Hirrow, Berlin-Charlottenburg, Goethestr. 15, Germ.

OFICO EN TEKNIKO. Kiu samideano en Germanujo donos al junulo 18 jara, talentita en desegno kaj pentro, oficon en tekniko ktp.? Ofertoj: Poslagerkarte 28, Perleberg, Germanujo.

PANO AL MALSATANTOJ! Kontraŭ ĵurnalo de virinaj aŭ viraj kostumoj kaj poloj mi promesas liveri 10 fut. da pano al persono, kies adreson la sendanto montras. En Kievo mi liveras panon, ekster ĝi monon laŭ kosto de pano. — Ukrainio, Kievo, Str. Proreznaja 16/4, Simono Prezenti.

500 ADRESOJ DE JAPANAJ KOLEKTANTOJ de poŝtkartoj ilustritaj, poŝtmarkoj ktp. estos aldonitaj al BES-adresaro (1-a eldono) aperanta en majo 1922. Prezo: 1.50 svis. franko. Sendu bankbileton aŭ neuzitajn poŝtmarkojn! Por Aŭstrio, Polio, Rusio 50% valurabato. Mendo ĝin tuj, se vi volas certe havi BES-adresaron! Karel Jelinek, Poŝtfako 60, Vinohrady, Ĉeĥoslovakio.

GAZETOJ MALNOVAJ! Bonvolu sendi per mia kolekto la malnovajn gazetojn: Bulteno de Libera Penso, Pedagogia Revuo, Polica Bulteno, Socia Revuo, Le Travailleur Espérantiste, Scienca Revuo, Stenografika Gazeto; al Jozefo Halasz, Agrarbanko, Targu-Mureş, Rumanio.

POR KIA AIN PREZO mi aĉetos la n-ojn 1-12 de ET kaj la marĉan numeron de „Esperanto“ (UEA) de l'jaro 1921. Adreso: Deziderio Tövisy, Targu-Mureş, Rumanio, Librejo Révész.

Registrita Fabrikosigno  
  
N-o 242161  
**ERNST VANOLI**  
FREIBURG i. Br., Germ., Starkenstr. 19.  
Fabrikado de novspecaj ludiloj.  
Eksporto ĉiulanden. — Kapablaj reprezentantoj dezirataj.

## Ce la Paulus-Eldonejo Graz, Austrujo

Karmeliterplatz 5

estas havebla:

*Suppl. Hanns, prof.*: Kiel oni fondas kaj organizas Esperantan grupon? (32 paĝoj kun kovriljo). Rekomendinda por ĉiu Esperantisto kaj Esperanta grupo. Prezo: 4.— mk., 4.— kĉ., 0,48 svis. fk., 2.— lit., 0,28 holl. guld.

*Suppl. Hanns, prof.*: La mondlingva problemo kaj la katolika eklezio (en germana lingvo) 24 paĝoj. Bonega propagandilo por Esp. inter katolikoj. Prezo: 5.— mk., 5.— kĉ., 0,60 svis. fk., 2,50 lit.

*Suppl. Hanns, prof.*: Esperanto-Kateĥismo (en germana lingvo) 24 paĝoj. Tute nova kaj tre taŭga varbilo por Esperanto. Informas pri la esenco, disvastigo kaj organizo de la Esp. movado. Prezo: 4.— gmk., 4.— kĉ., 0,48 svis. fk., 2.— lit.

*Schamaneck, Jos.*: Esperanta lingva kaj ekzerca libro. En germ. lingvo. Dua eldono. Prezo: 6.— mk., 6.— kĉ., 0,60 svis. fk.

Esperanta gvidlibro tra Graz. 80 paĝoj. Bele ilustrita. Prezo: 2.— mk., 2.— kĉ., 0,24 svis. fk., 1.— lit.

*Frank, Leonhardo*: La Patro. 16 paĝoj. Skizo kontraŭmilita. Prezo: 2.— mk., 2.— kĉ., 0,24 svis. fk., 1.— lit., 0,14 holl. guld.

*Benedikto XV.* Kristo kaj la ligo de la nacioj. 16 p. Prezo: 2.— mk., 2.— kĉ., 0,24 svis. fk., 1.— lit., 0,14 holl. guld.

Krom tio estas kalkulata 30% prezaltigo.

## HUNGARA VINO.

La unuarangaj vinoj de la Tokaj-Hegyalya-provinca Vin-Komerca Akcia Societo, Budapeŝt, seriozaj firmoj povas malmultekoste ricevi Eksporto al ĉiuj landoj de la mondo.

— Botelvinoj. —

Informojn donas

Paŭlo Balkanyi, Budapeŝt VI,  
Hajos u. 15.

## Internacia bela literaturo kaj instruaj verkoj:

Bennemann Paul. **Tra la mondo.** Internacia legolibro. 1-a parto: Por komencantoj. Kun multaj bildoj kaj muziknotoj. 2-a eldono. Kartonite M. 20.—  
2-a parto: Por progresintoj aperos dum Majo.

Dietterle Joh., Prof., D-ro, Direktoro de la Esperanto Instituto por la Germana Respubliko en Leipzig **La Vendreda Klubo.** 11 originalaj artikoloj verkitaj de Vendreda-Klubanoj. Kun unu portreto kaj kelkaj desegnaĵoj M. 30.—

Goldschmidt Thora. **Bildotabuloj por la instruado de Esperanto.** Prilaborita de Prof. D-ro Joh. Dietterle. 2-a korekta eldono kartonite M. 32.— bindite M. 40.—

Hebbel F. **Gyges kaj lia ringo.** Tragedio kvinakta. Esperanton tradukita de P. Bennemann bindite M. 40.—

Lippmann Walter. **Dr. Zamenhofs Sprachliche Gutachten — Lingvaj Respondoj** — in deutscher Bearbeitung mit Ergänzungen und Erläuterungen  
Kartonite M. 18.—

... kun plej bona sukceso kurskondukantoj ĝin uzos kiel taŭga ilo dum kursoj por perfektigantoj kaj en ekzamenoj por diplomotoj. — Fridri-Zürich.

Richter R. **Esperanto-Gvidanto por publika interkomunikado.** Preparilo por la ekzameno pri kapableco M. 10.—

Thurston, Temple E. **La urbo de belega senŝencajo.** Romano el la angla lingvo, trad. de R. Spero bindite M. 40.—

### Internacia Librotrezoro.

Kolekto de elektitaj kaj rekomendindaj romanoj, noveloj, humorajoj, poemoj ktp.

Kajero 2/4. Hankel M. **Sableroj.** Poeziaĵoj kaj skizoj. Kun portreto de la altŝatata aŭtorino M. 12.—

La prezoj estas la nuntempaj (Aprilo 1922). Ŝanĝoj estas rezervataj. La prezoj por lernolibroj kaj legolibroj uzataj en kursoj kaj lernejoj validas ankaŭ por la bonvaluta eksterlando. Je la prezoj de ĉiuj aliaj verkoj kalkulu la laŭleĝan valuto-alpagon: 60% por la mez- kaj 100% por la altvalutaj landoj. Al antaŭpagata mendo aldonu 20% sendelspezoj.

Esperanto-Katalogo senpage laŭ peto.

## Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-Fako, Leipzig, Salomonstr. 15.

Bankkonto: Deutsche Bank Fil. Leipzig — Poŝtĉeka konto: Leipzig N-o 52372.

## Vin-Barelojn

kaj aliajn barelojn novajn kaj uzitajn, el slovakia kverko, en ĉiuj grandoj kaj en ĉiu kvanto ofertas je plej malaltaj prezoj

David Eckstein, Sered, Slovakio.

Korespondado: Germane kaj Esperante.

### Abonejoj de ET en la landoj:

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Münchsberg 5, Salzburg; por Wien „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II, Postamt 34  
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen.  
Bulgara: Georgi Fr. Gaŝevski, Bul. Maric Luiza 46, Sofia  
Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Kralovė. Otto Lumpe, Trautenau.  
Estonia: Est. Esp. Unuiĝo, postkast 6, Tallinn.  
Finna: O/Y. Movado A/B, Kasarminkatu 20, Helsinki.  
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.  
Hispana: Konrado Doménech, Gerono, Rambla Alvarez 12-2.  
Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-11-2, Budapest VI.  
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamaĉi, Aojama, Tokio.  
Litova: Paŭlo v. Medem, Smeliu g-ve 12, Kaunas (Kovno).  
Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.  
Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.  
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm I.  
U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

LA PLEJ FAMAJ SONORIL-KONCERTOJ en la tuta mondo okazas en Mechelen (Malines) apud Antverpeno en Belgujo. Petu informojn de: Inlichingsbureau (Inform-oficejo) Bruel 125, Mechelen.

FIDELECO KAJ ESPER' Himno pri fideleco al Esperanto. Prezo: kanto kaj forteplano 1 fr. fk. Havebla ĉe l' aŭtoro: S. Frantz, 21, Rue Alain-Charlier, Paris.

SIGELMARKOJN Esperantajn, insignojn, kaŭĉukajn stampilojn por societoj, poŝtkartojn liveras tuj Jozefo Kocourek, gravuristo, Wien X, Arthaberplatz 3-14. Oni korespondas en lingvoj: ĉeĥa, germana, rusa kaj Esperanta. Postulu specimenaron de Esperantaj sigelmorkoj kontraŭ 2 respond-kuponoj.

PASTRO L. W. CRONKHITE, post kvardekjara laboro, ekigis sian misian laborkompon ĉe Bassein, Burma, en frua aprilo, por reiri al sia usona hejmo: Nova adreso: Greenwich, N.Y., U.S.A., kien li alvenos ĉirkaŭ la unua de junio. Li aparte bonvenus lerejojn kaj poŝtkartojn ilustritajn montrantaj ĝinfanojn. Responde li sendos lerejojn kaj Burmajn kaj Hinduajn kartojn.

### Korespondeo kaj Interŝanĝo.

Fraŭlo Friedrich Hahn, 19, Eichenpromenade, Perleberg, Germanujo, insistas petas korespondadon kun gebontemplanoj, gerehabilitanoj, aliaj geabstinentuloj eksterlandaj, kaj korespondadon kun Maroklando, Algerio kaj ĉiuj genordafrikanoj.

S-o Jan van Schoor, Sint-Laureyskaai 12, Antwerpen, Belglando, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. (bfl.) pri ĉiuj temoj; interŝanĝas ankaŭ poŝtmarkojn.

Kelkaj laboristaj junuloj deziras korespondi kun samklasuloj ĉiulandaj. Respondu al s-o E. Kull, Box 4, Korsnäs, Svedujo, kiu petas la aferon.

Firenze, Italio, capit. Michele Liverani, Via S. Gallo 27, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr., naĉajn ilustr. gazetojn, ĉiusepacajn fotografajojn.

Mi deziras korespondi kun gesamideanoj de ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Litovio Slaudai. Kriminales skyrius, f-ino Olga Bredulis.

Poŝtmark-kolektantoj atentu! Mi serĉas filatelistajn interrilatojn kun la tuta mondo. Mi ŝanĝas kaj vendas. Mi posedas grandan aron da belaj aŭstraj poŝtmarkoj. Kontraŭ referencoj mi forsendas belajn elektajojn de aŭstraj poŝtmarkoj, por aĉeto aŭ vendado. — Josef Kolhofer, Wien 13/4, Zehetnergasse 37.

Deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun gesamideanoj de ĉiuj landoj: Juhano Wakonigg, Köflach, Stirio, Aŭ-trujo.

S-o Aicher, Wien 4, Lambrechtg. 10, Aŭstrio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, gazetojn kun ĉiuj landoj.

S-o Max Michalski, Mostowa 5 a. II, Poznan, Polujo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj (bfl.), precipe pri teatro, muziko kaj diversaj.

S-o J. B. C. de Koster, 98 Dalton Str., Den Haag, Nederlando, deziras ŝanĝi sport fotografajojn, naĉajn kostumojn, poŝtkartojn aŭ poŝtmarkojn.

Poŝtmark-kolektantoj! Interesaj kaj maloftaj poŝtmarkoj de Litovio, Latvio, Rusujo, Estoni, Ĉeĥoslovakio, Rumanio, Belgio, Hungario, Ameriko ktp., ĉ. 2000, estas vendataj de s-o S. Ŝikŭs del B. J., Vidiškiai, Ukmerges apskritis, Litovio.

Adalberto Mahler, Budapest VII, Peterfy Sandor u. 38, Interŝanĝo kun seriozaj filatelistoj de ĉiuj landoj. Baza. Michel, Senf, Yvert 21/22. De 1914 ĝis la plej fresaj novaĵoj (ĉio nestampita), plue okupaciaj serioj de Baranya, Debrecen, Szeged ktp. Garantitaj de oficialaj kompetentuloj. Povas sendi. Ne sendas unue. Petas precipe poŝtfresajn kompletajn novaj-seriojn. Sendajoj malpli ol 200 gmk. aŭ 100 fk. (same foje) ne estas akceptataj. Informoj. — Sendu registrite! Afranku filateli!

Alfred Klein, Miskolcz, Hungario, Daya Gabor utca 1, deziras korespondi pri ĉia temo kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiu lando. Korespondas Esperante, germane, france.

Denes Flürth, Miskolcz, Hungario, Vay ut. 7, interŝanĝas poŝtmarkojn. Deziras aliajn eŭropajn kontraŭ hungaraj kaj bosnaj valoraj markoj.

F-ino Anna Pechan, Pécs, Felső-malom str. 18, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun eksterlandanoj (bfl.).

S-o Aleksandro Weisz, Zsolczai-kapu 5, Miskolcz, Hungario, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn ilustr., papernonajn, gazetojn kaj lerejojn (precipe kun turistoj pri turistaj temoj).

S-o E. Van Beughem, instruisto, Paleisstraat 140, Antwerpen, Belglando, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj kaj lerejoj.

S-o J. Sapirŝtejn Gomel, Rusio, poŝtkesto 23, interŝanĝas poŝtmarkojn kaj Esp. gazetojn.

Inte-Henriko Čače, Ventspil (Windau), Latvujio, Puku ielā 23, instruisto, sciigas ĉiujn siajn gekorespondantojn pri alveturo el Petrograd kaj petas ilin, bonvole dadrigi la interŝanĝadon de lerejoj kaj ilustr. poŝtkartoj; interesigas pri blinduloj.

Serioza interŝanĝo. Poŝtmarkserioj, poŝtkartaroj, moneroj. Profesoro José Ventura, 12, Roteros, Valencia (Hispanio), gvidanta Universitatan kurson. Malakceptas bagatelojn. Transdonu lian adreson al eksterŝtatanoj!

S-oj Axel Nordlander, Viktor Eriksson, Valder Odman deziras korespondi kun samideanoj el Aŭstrio, Germanujo, Francujo kaj Hinujo. Adresu nur al urbo Nyland, Svedujo.

S-o J. B. E. de Koster, 98 Dalton Siraat, Den Haag, Nederlando, deziras ŝanĝi fotografajojn pri sporto, pejzaĝoj aŭ naĉaj kostumoj.

Kvar anglaj gesamideanoj deziras interŝanĝadi ilustr. poŝtkartojn kun la tuta mondo:  
F-ino S. S. Kilgour, 126 Mortimer Road, London N. W. 10.  
S-o T. Glover, 5 Vancouver Road, London S. E. 6.  
S-o L. A. Marlin, 4 Charlton Lane, London S. E. 7.  
S-o R. E. Hoskins, 38 Peacock Street, London S. E. 17.

S-ino Regina Mayer, Timiŝoara III, str. Tirol 55, Rumanio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kun la tuta mondo.

Eugen Tyroler, Timiŝoara I, Schlossgasse 5, Rumanio, interŝanĝas poŝtkartojn ilustr. (bfl.) kaj korespondas (pli bone esprimite: ludas) ŝakon kun la tuta mondo.

Mi ne deziras, plej interŝanĝi kontraŭ poŝtmarkoj el Germanio kaj Ĉeĥoslovakio. Wiljo Saaristo, Viipuri.

S-o Max Hubl, Salzburg, Aŭstrio, Auerspergerstr. 54, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj.

S-o Fritz Knoll, Plauen i. V., Germ., Gartenstr. 10, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. (bfl.)

Du amikoj deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kun tutmondaj gesamideanoj, precipe kun porcelanpentristoj. — Rud. Friese, Waldenburg, Auenstrasse 33, Schlesien, Germ. — Emil Reimer, Neu-Weisstein, Kreis Waldenburg, Bergstr. 7, Schlesien, Germ.

S-o Ernst Streubel, Plauen i. Vogtl., Germ., König-Georg-Strate 5, I., deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj (bfl.).

Kiel membro de bonfarema institucio por libertempa restado de malsatitaj infanoj mi kolektas alilandajn poŝtmarkojn. Por bone atingi tiun celon, mi interŝanĝas ilin kontraŭ samprezaj germanaj poŝtmarkoj. S. Schön, Hamburg, Neuer Steinweg 1, Germ.

Kiu sendas al mi 100-200 poŝtmarkojn de sia lando (minimume 50 el kiuj malsamaj) ricevos saman kvanton da germanaj poŝtmarkoj. Walter Amort, Falkenhorst bei Grünau bei Berlin, Waltersdorferstr. 65, Germ.

Por korespond-vespero de finigonta kurso oni petas alsendon de lerejoj kaj ilustr. poŝtkartoj ĝis 1. majo; ĉiu sendajo estos respondata. — Adresu ĉion al s-o R. C. Brakel, Köln-Nippes, Germ., Christinastr. 31.

S-o Otto Kummer, juna instruisto, Merseburg a. Saale, Friedrichstr. 14, Germanio, deziras korespondi precipe kun fraŭlinoj.

S-o Willy Weillepp, juna instruisto, Merseburg a. Saale, Haackestr. 2, Germanio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj lerejoj kun ĉiuj landoj, precipe kun orientaj landoj, kiuj ankaŭ preferu kun fraŭlinoj.

S-o Rudolf Bieriŭmpfel, Lauchstedterstr. 45, Merseburg a. Saale, Germanio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kun ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj.